# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 29/04/2021 Kvincentdudekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)




**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 818,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **286,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **237,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)


Nun studas **214,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **81,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).




N.ro 32 de "Por Komencantoj".



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kiuj estas la kernvortoj de la subjektoj en la sekvantaj tri frazoj:

A. La granda flugmaŝino surteriĝis sen problemoj.

B, La tutan kukon ĝoje manĝis la ĉeestantaj infanoj de la lernejo.

C. Dum la tuta tempo mia plej juna filino veturis kun mi.

2). Skribu la kernvortojn de la gramatikaj objektoj en la sekvantaj frazoj:

A. Pasintan jaron mi forlasis la grandan urbon por loĝi en la kamparo.

B. La grandan pomon mi formanĝis en dek minutoj.

C. Dum la vespero miaj gefiloj faras ĉiujn siajn hejmtaskojn.

3). Se la infinitivo estas la kernvorto de gramatika objekto, ĉu ĝi povas havi prepozicion antaŭ si?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 528. *Marcel Leereveld*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## _La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



maljuneco http://esperantaretradio.blogspot.com.

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

La plej bona propagando baziĝas sur faktoj, kiel eĉ Joseph Goebbels diris.

## Humurbildojn




Multe da humurbildoj (kun komentoj) mi prenas el E-retpaĝoj!
Mi nur por iuj BILDOJ (eble triono?) aldonas mian komenton (rimarkon, ŝercon)...Mi estas nur KUNaŭtoro de iuj bildoj!
Sube estas ligilo al mia magazino de jam prezentitaj humurbildoj...
Iru tien kaj prenu! https://tiny.pl/rn9gc

- Doktoro, mi havas truojn en mia memoro!
- Ĉu delonge vi havas tion?
- Kion?
- Truojn.
- Kiujn truojn?



Panjo diris: “Ne tuŝu per manoj”



**Mi pli ŝatus matenon se ĝi komenciĝus pli malfrue...**



https://tiny.pl/rn9gc_ Kun elkoraj salutoj *Marian* *ZDANKOWSKI*

**Daniel Kane 1948-2021** Mi estas certa, ke mi parolas por multaj, kiam mi esprimas mian malĝojon pri la morto de Danny Kane. Mi renkontis lin nur kelkfoje, sed li estis ĉiam bonhumora kaj amikema homo. Li ripozu nun en paco! *Trevor Steele*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## "DANIEL KANE"




Mia amiko, Danny Kane, mortis. Afero kompatinda por sia familio, siaj amikoj, kaj por la Esperanto movado.
Marcel

Danny estis elstarulo, ne nur kiel flua Esperantisto, sed en la Aŭstralia Diplomata Servado (li estis la tria Sekretario de la aŭstralia Ambasadorejo en Pekino).

Sed ĉe ĉiu ĉagrenoplena momento miaj pensoj flugas al kiam Danny kiel junula feliĉulo ĝojis vigle. Li miris pri la mondo, kaj deziris lerni ĉion

La entuziasmo de Danny kontaĝiĝis, vigle subtenita de Ivan Helzingen.

Mi rigardis hodiaŭ, 'Umeco', la ĵurnalo por la Esperanto junaĝuloj ke Danny kaj fondis kaj redaktis en 1965. Mi rimarkis ke Danny skribis pri « Ned Kelly – Merdisto aŭ Martiro », kaj « la Famaca Rum Rebellion de Aŭstralio ». Tio estis Danny kiel mi memoras lin : ĉiam li amuzis nin pri multaj malsamaj interesaĵoj. Mi kredas ke Danny kreskis en nerimarkinda familio en Melburno, sed finfine li iĝis profesoro de la Ĉina lingvo ĉe la Macquarie Universitato.







Mi sciis ke Danny malsanis sed morto estis neatendita. Ne plu ni povos ridi kaj ŝerci kune.
*Charles Stevenson*

## Sekvaj E-kursoj kaj renkontoj ☆ en la franca E-kastelo Gresillon

**Karaj**
Jen la aktuala programo laŭ nia reta agendo:
**https://gresillon.org/agendo**
Por ajna demando skribu al: gresillon@gmail.com aŭ kastelo@gresillon.org
Dum 2021- aprilo, majo, julio, aŭgusto kaj oktobro


Sanon kaj liberon ! ***Bert ŜUMAN***





***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***


## PARTO KVIN




La LM decidas kiam konflikto komenciĝas. Tiumomente, iru ĉirkaŭ la tablon, kaj permesu ĉiun batalanton fari atakon vice. Kio konsistigas "atakon"
dependas de la naturo de la batalo, sed ĝi ĉiam devus esti rulita (se dialogo estas enmiksita) aŭ priskribita en amuza detalo (se ĝi estas fizika kaj/aŭ danĝera kaj/aŭ bezonas/bezonus necesigi kontraŭkoncipilojn). La LM determinos kian speconaŭ de Kliŝo taŭgas por la batalo. En simpla fizika batalo, Kliŝoj tiel Vikingo, Soldato, Muskedisto, kaj Ernest Hemingway estas egale taŭgaj, sed Kliŝoj kiel Frizisto kaj Latina Amanto ne estas.

Atakoj devas esti direktitaj al kontraŭulo. Ambaŭ partioj en la atako (atakanto kaj defendanto) rolu kontraŭ sia elektita Kliŝo. La plej malalta rolo malgajnas. Precize, la malalta rolanto perdis unu el siaj Kliŝoĵetkuboj dum la cetero de la batalo - ili estis malfortita, eluzita, malkuraĝigita aŭ alimaniere puŝita unu paŝon al malvenko.

Finfine, unu partio restos staranta, kaj la alia restos sen ĵetkuboj.
Tiumomente, la venkantoj decidos la sorton de la malvenkantoj. En fizika batala aŭ magia duelo, la malvenkantoj eble estos mortigitaj (aŭ gracie ŝparitaj). En Juĝeja Klaŭnaĵo, la malvenkanto estos kondamnita de la juĝo, aŭ malsukcesis jure persekuti. En Delogado, la malvenkanto ricevas aŭ malvarmegan duŝon aŭ varman versperon, depende...
... Kvankam la LM rifuzos batalajn rezultojn kiujn ne havas sencon en kunteksto (se vi venkas iun en Teniso, vi kutime ne povas decidi senkapigi ilin kaj treni ilian kadavron tra la urba placo), la rabaĵo de venko estas alie la elekto de la venkanto.
Delogadon: Unu rolulo (aŭ pli) penanta gajni poentojn kun unu alia rolulo (aŭ pli), kiu penas rezisti.
Juĝejaj Klaŭnaĵoj: Akuzisto kontraŭ Akuzito. La celo estas venko.
Justeco estas flanka.
Vera Regula Batalo: Homoj penantaj vundi aŭ mortigi unu la alian.
Dankon Ŝohano



*(Shayne Power)*

**Por via informo.** La mesaĝon ni jam sendis al UN. Se en la venontaj kelkaj tagoj AEA indikus al ni sian subtenon, ni povus komuniki tion al la koncerna instanco ĉe UN *Humphrey Tonkin*

## ~~URGHE:~~ Tago de la Angla Lingvo -- ~~peto pri subteno~~

Karaj gvidantoj de E-asocioj en landoj kie la angla estas oficiala lingvo.

Ne estus taŭge, ke UEA elpaŝu okaze de la ses specialaj tagoj dediĉitaj al la ses oficialaj lingvoj de UN, sed ja taŭgus, ke la anglalingvaj landaj asocioj, aŭ la franclingvaj, aŭ la hispanlingvaj ktp. tion faru en siaj respektivaj "tagoj".



Tre lastmomente, ni verkis mesaĝon okaze de la Tago de la Angla Lingvo. Mi sendas ĝin al vi kun la espero, ke vi pretos doni vian moralan subtenon al tio, ke ni sendu ĝin al UN nome de via asocio kaj de la aliaj anglalingvaj E-asocioj.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Sed evidente necesas agi tre rapide. Ĉu ni havas vian subtenon? Se jes, bonvolu tuj kontakti min kaj mi aranĝos la transsendon al UN. Vi trovos la tekston en du lingvoj ĉi-sube. Kore, *Humphrey Tonkin* tonkin@hartford.edu. (Nun estas tro malfrua agi)

**Tago de la Angla Lingvo – 23 aprilo 2021**

Dudek procentoj de la monda loĝantaro uzas la anglan lingvon kiel unuan, duan, aŭ aldonan lingvon. La angla ofte estas karakterizata kiel *la superrega* lingvo de komunikado internacia; tamen okdek procentoj de la monda loĝantaro ne uzas ĝin aŭ havas minimuman scipovon. Aŭtentike tutmonda komunikado bezonas vastan repertuaron de lingvoj por instigi dialogon, dissemi konon, kaj antaŭenigi daŭripovan evoluigon. Inkluziva komunikado estos pli grava ol iam ajn antaŭe dum ni alfrontas la komunajn defiojn de rekonstruado post KOVIM-19. La angla estas *unu* lingva ilo inter multaj. Ĝi povas kompletigi sed neniam anstataŭi aliajn lokajn kaj ĉefajn lingvojn de la mondo, inkluzive Esperanton, kiu estas lingvo kreita por antaŭenigi pacon kaj interkulturan komprenon. La tagoj de UN pri lingvoj celu konsciigi pri multilingveco kaj lingva diverseco. En ĉi tiu Tago de la Angla Lingvo UEA vokas la UN-komunumon kaj civilan socion konsideri la lokon de la angla en la multlingva ekologio de la lingvoj de la mondo.

Universala Esperanto-Asocio

***English Language Day – 23 April 2021***

*Twenty percent of the world's population uses English as a first, second, or additional language. English is often characterized as the language of international communication, yet eighty percent of the global population does not use it or has minimal proficiency. Truly global communication requires a broad repertoire of languages to foster dialogue, disseminate knowledge, and promote sustainable development. Inclusive communication will be more important than ever as we face the shared worldwide challenge of building back after COVID-19. English is one linguistic tool that can complement but never replace other local and major languages of the world, including Esperanto, a language designed to promote peace and intercultural understanding. UN language days seek to raise awareness of multilingualism and linguistic diversity. On this English Language Day, UEA calls upon the UN community and civil society to reflect on the place of English in the multilingual ecology of the world's languages.*



# El Sud-Aŭstralio

- La unua klub-renkontiĝo post almenaŭ unu jaro (ekster la monataj renkontoj) de Esperanto en Sud-Aŭstralio okazis la 24an de Aprilo en la nova domo de Indrani.

Ni ne estis multaj, kelkaj estis for aŭ malsanaj. Tamen por tiu-ĉi 'Literatura' kunveno, ni aŭdis diversajn poemojn, mallongajn rakontojn, ŝercojn kaj eĉ verkitajn detalojn pri la vivo de Neville Shute. Kompreneble poste ni ĝuis kelkajn frandaĵojn.



Espereble okazos pli da tiaj renkontoj (ekster la kutimaj monataj renkontoj) nun kiam ne estas plu da COVID-limigiloj! *Indrani Beharry-Lall*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# El Brizbano

## Pri la aprila sabata kunveno.





Sabaton je la 24a de aprilo, ni akceptis la afablan inviton de Claire, kaj kunvenis ĉe ŝi kaj ŝia edzo Phil. Nia nombro estis iomete malgranda sed ne gravis, ni tamen spertis ĝuindan tagon kaj tre bonan meztagmanĝon. Pluse estis granda plezuro havi la ĉeeston de Erhard. Ni ankaŭ ĉirkaŭregardis ilian ĝardenon kun ĝiaj interesaj plantoj, la kokoj, kaj eĉ koturnoj. Claire ankaŭ vidigis al mi sian biciklon faldeblan kaj mi tre enviis ĝin ĉar ĝi havas 24 rapidumojn kaj la mia havas nur 7 :-((




Erhard kunportis belan moneron (vidu bildon) kiu estis fabrikata por rememorigi la faman kurĉevalon, *Black Caviar*. Li grandanime donacis po unu al ni. Antaŭ kaj malantaŭ la formala kunveno ni babilis en la belega vetero de vintro en Brisbane. Poste ni meztagmanĝis. Ĉiuj kunportis ion por manĝi, kaj Phil pretigis kolbasojn, Claire preparis freŝan salaton el la ĝardeno. Doug Eising

Bildo, supre, montras gastigantino Claire kaj estimata Esperantisto Erhard. Vidu la eta krokodilo. Ĝi faris certa ke vi ne parolas la anglan.



# La Manlia Esperanto-Klubo





***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 1a de majo estos la tria sabato. Venu ! Ĉiuj bonvenaj *Roger Springer*

Komentario de la Manlia Klubo SAT 17-4-2021: inter la bluakvo kaj la blankakvo.
Ĉi-matene estas ĉefe maldika nubo kun rompado de suno kaj tre malgrandaj ondoj en la oceano. La nuna loko de renkontiĝo post la endomigo pro korona viruso, apud la plaĝo de Manlio, donas pli larĝan horizonton ol nia malnova loko ĉe la biero-kafejo. Kaj do pripensado de niaj agadoj ankaŭ pligrandiĝis. Konsideri kelkajn novajn manierojn lerni inter konversacio kaj materialo leginda pri diversaj temoj ŝajnas helpi plibonigi nian komprenon kaj kaptadon de la lingvo.



Post mia lastatempa legado de kelkaj el la plej diversaj interesaj libroj disponeblaj, mi trovas novajn angulojn pri historio, precipe la lastaj 2 aŭ 3 jarcentoj, kaj konscias, ke multaj influoj kaj karakteroj en la unua duono de la 20a jarcento havas siajn originojn ĉirkaŭ la sama tempo kiel la publikigo de Esperanto.

Kaj do ĉi tiuj bildoj kombinis en vizio de forigo en 1887 de la bona ŝipo Esperanto en la vastan oceanon de la menso de la homaro, renkontante malgrandajn havenojn de alvoko dum sekvantaj jaroj, antaŭ ol ĝi okazigis la unuan gravan publikan renkonton en 1905.

La vespera novaĵobulteno raportis mallongan viziton de malgranda baleno al la kajo de Manly Cove, apud nia antaŭa renkontejo. Estis bone ke ĝi rapide moviĝis kaj eble sentis , ke ĝi estis en la areo kie la pramo endokiĝas Fartu bone malgranda baleno. *Jano Wylles*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



# NE lasu nur la ĉefministron kun la sekretaj sekurecanoj decidi pri NIAJ militoj!

### KIOJ ESTOS LA REZULTOJ?

La rezultoj estis: **Unue** ke ni devis militi en Irako, la rezulto de kiu milito tre fortigis la fanatikajn Islamanojn. **Due** ke ni devis militi en Afganistano, anstataŭ lasi la rusojn kompletigi sian tiean reĝimon detruantan la fanatikan Islaman Ŝtaton. **Trie** ke ni devis militi en Vjetnamujo, kiun militon ni perdis. Tre verŝajne ni devos militi en Persujo (Irano), se Usono deziras tion. Kaj ni eble devos militi en Ĉinujo, se Usono deziros tion. En tia necerta milito la aŭstralianoj ege suferos, multe pli ol la usonanoj. Nur se Ĉinujo milite atakos Aŭstralion dum ni estas neŭtralaj, Aŭstralio rajtu militi kontraŭ ĝi. Sed tio estos tre neverŝajna, se ni restas neŭtralaj.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Devigu la Labor Party ŝanĝi la leĝon ke nur la ĉefministro rajtas decidi pri niaj militoj!

**KIO ESTAS LINGVO?**

Animaloj, inkluzive la homojn, ricevadas en sian menson impresojn pri la ekstera mondo kaj pri si mem. La impresoj envenas en la menson per aŭdado, vidado, sentado kaj gustado, kaj tiuj impresoj stapliĝas en la menso kaj povas ankaŭ ricevi tujan reagon. Jam nehomaj animaloj uzis sonojn por distingi la reagojn. La homo evoluigis pli komplikan sistemon de aŭdaj reagoj, kiu estis la komenco de la lingvo. En la lingvo la sonoj tiom diferenciĝis, ke ili povis indiki kaj reprezenti tre multajn impresojn en la menso. La multegaj kombinaĵoj de sonoj por reprezenti la eksteran mondon nomiĝas vortoj. En kelkaj lingvoj, kiel ĉe eskimoj, unu tia vorto reprezentas tutan okazon, sed en la eŭropaj kaj aziaj lingvoj difinita parto de la okazo aŭ situacio havas sian propran vorton, kaj por rakonti tutan okazon oni uzas kombinaĵon de vortoj. En eŭropaj lingvoj tiuj apartaj vortoj reprezentas certajn partojn de okazaĵo, ĝenerale iun agon, ĝian ekzekutiston, ricevanton de la ago, kaj la cirkonstancojn. Oni nomas tian grupon "propozicio" aŭ "frazo. Aliaj lingvoj kunligas kelkajn partojn kune sub unu vorto. Situacioj esprimiĝas simile. Lingvo do estas kombinaĵo de vortoj parolataj aŭ skribitaj por reprezenti la okazojn kaj la situaciojn en la ekstera mondo kaj registritaj en la menso. *Marcel Leereveld.*

**KATJA IGIS MIN PLORI,**

ĉar ŝi diris ŝercon, kiun mi komprenis kiel seriozan: ŝi anoncis antaŭ du semajnoj, ke la adelajdaj Esperantistoj ne plu kunvenos, sen diri la ialojn. Ŝi ja, ŝerce, anoncis, en A.E. n.r 526, paĝe 3, ke "La LASTA kunveno de la sudaŭstralianoj okazis la 7-an de aprilo." Mia plorado finiĝis la sekvantan semajnon, kiam mi eksciis ke la anonco estis nur ŝerco ŝia, ne la vero. *Marcel*.

Ambaŭ kontraŭmilita kaj klimato movadoj batalas por justeco kaj vivo por ĉiuj homoj *RS*

**Ofte fihomoj povas esti efikaj soldatoj**

**La tialo pro kiu mankas informo pri via klubo estas ke via klubo ne sendis ĝin al AE**

# El Svislando

Karaj gelegantoj de AE, skribas ĉi tie Ueli Haenni, Esperantisto kaj kuracisto kaj biciklisto, kantanto korusa kaj verketisto en Svislando. Venontsemajne estos, je ĵaŭdo, 6-a de Majo, *Wishbone Day* - la internacia tago pri Osteogenesis Imperfecta (OI). Nialingve, la latinlingvan priskribon <<OI>> oni bone povas komprenigi per <<Rompiĝemaj Ostoj>>.

Ĉar Wishbone Day komenciĝis pro volontuloj en **Aŭstralio** en jaro 2010 kaj fariĝis cetere jam tre vastkonata evento internacia kun kontribuoj el pli ol 90 landoj ĝis nun, mi fieras povi anonci ĝin **nialingve** en AE.

Rompiĝemaj Ostoj estas hereda malsano. Ĝi estas malofta. Laŭ medicina statistiko, en Aŭstralio, kun loĝantaro de iom pli ol 25 milionoj, vi trovos inter 1700 kaj minimume 1000 homoj vivantaj kun (latinlingve) OI.

Ĉe personoj, kiuj vivas kun OI, troveblas kelkaj el jenaj komunaj trajtoj:

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

rompiĝemaj ostoj
malalta staturo
kurbaj ostoj
ostorompiĝoj
malbonaŭdeco
malforta muskola tonuso
kronika doloro osta
malfacilaĵo por spiri
artika malforteco
bluaspektaj skleroj
laceco




Komprenu ankaŭ la esprimon <<*Wishbone*>>: Ĉe OI-uloj, ĉiuj ostoj povas facile rompiĝi. Je dankesprima festo en Kanado kaj alie en la mondo, la manĝintoj de meleagro prenas la klavikulan oston de tiu birdo kaj per tiro de du etfingroj rompas la delikatan oston. Du deziroj, "*wish*" antaŭ la ektiro estas esprimitaj, kaj venkas tiu tiranto, ĉe kies flanko la osto cedas.
La Brita organizaĵo "*Brittle Bone Society*" elektis la klavikulan oston pro ĝia facila rompiĝo kiel simbolon por la Rompiĝemaj Ostoj de la membroj.

La logobildo montras la klaviklo-oston, estonta divenvergo: rompo tie ---> aŭ <--- tie?

Se vi legas en angla lingvo, iru ĉe https://www.oiaustralia.org.au/about-oi/ por informiĝi pli detale pri. Ankaŭ OIFE.ORG estas adreso plurlanda. Venontsemajne, atentu pri flava koloro ĉe homaj vestaĵoj, legu pri www.wishboneday.com ankaŭ anglalingve, vidu ĉe la Bharata / Hindia "*Indian OI Federation"* www.ioif.org. Aŭ simple per VIA LiNGVO serĉu Osteogenesis. Mi volas aldoni pri *wishboneday* iom en la eldono de AE kiu estas planata por 2021-05-06.

**3ZZZ** …… En la elsendo de la 26a de aprila troviĝas informoj pri la Esperanto movado kaj la Esperanto lingvo, pri la negativaj efikoj de koronaviruso kaj literaturaĵoj *Franciska Toubale*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO**



1). A. flugmaŝino. B. infanoj. C. filino.
2). A. urbon; B. pomon; C. hejmtaskojn.
3). Ne, ĉar objekto en la frazo neniam havas prepozicion antaŭ si, sed ĝi ricevas la finaĵon -"n". *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***